

TRA LA MONDO ESPERANTISTA.

Pri la blinduloj kaj Esperanto.

Kara leganto, ĉu vi iam pripensis, kia via sorto estus, se vi estus blinda?

Kion ni, viduloj, entute scias pri la blindulo, pri lia naturo kaj kapableco? Nur ke mankas al li la kapablo vidi. Al tiu ĉi negativa scio ligiĝas amaso da eraraj kaj al l' afero de la blinduloj tre domaĝaj ideoj pri ne nur lia korpa, sed ankaŭ lia spirita kompetenteco.

Pro tio, ke mankas la korpa vido, oni ne povas pensi ke la spirita rigardo povas esti sufiĉe penetranta. Oni kredas ke blindulo estas spirita mizerulo sen povo fari ion ajn vere utilan. Se iam oni ekprovas helpi lin por utiligisian povon, tio ĉi okazas ne pro l' espero al feliĉa rezultato, sed pro kompatato. Faroj, kies estiĝo estas frukto de kompatemo, estas maloftaj.

Ĉu tio ĉi estas la kaŭzo de tiu fakto, ke ĝis nun oni nenion aŭdis pri blinda esperantisto?

Tamen la inteligenteco de la blindulo egalvaloras tiun de l' vidulo. Koncerne tion, kio lin aparte interesas, li lernas ekstreme serioze kaj zorge kaj prezentas en sia laboro energion kaj persistecon eĉ superantan tiun de l' vidulo, ĉar al li mankas l' amuzoj de l' vidulo, kiuj logus lin for de la laboro. Por li tial la laboro pli ofte ol por la vidulo estas fonto de vera plezuro, kaj liaj amuzoj — mi parolas ĉiam pri la inteligenta blindulo — prefere konsistas el interŝanĝo de pensoj pri seriozaj kaj utilaj temoj.

Ĉu persono de tiaj ecoj: energio, persistemeco, fidelemeco al la laboro ne estus bona helpanto en la esperanta laboro? Certige! Mi eĉ pretendas ke venos al ni el la blindularo unuj el niaj plej sindonaj kaj sen-

miemaj apostoloj. Faktoj freŝaj konvinkigis min pri tio.

Mi ĝojas doni al la legantoj de nia gazeto la tiel agrablan kiel surprizigan sciigon, ke l' afero Esperanta en la sveda blindularo posedas ne nur interesigantajn amikojn, sed de tre longa tempo eĉ entuziasmajn *propagandantojn*. La organo de la sveda blindularo, semajna revuo «*De blindas vekblad*» nome de kelkaj monatoj malfermis konstantan esperantoapartaĵon, kiu estas redaktata de juna esperantisto, ne nur blinda, sed ankaŭ preskaŭ tute surda kaj kun kriplaj manoj! Se do la naturo sufiĉe avaris al lia korpo, ĝi donis des pli riĉajn donacojn al lia spirito. Kun miriga laboremo kaj persista diligenteco en tiu ĉi homo unuigas neordinara sciencosoifa inteligenteco.

Lin aligis al Esperanto membrino de Klubo Esperantista en Stokholmo, talenta eksinstruistino de surd-mutaj infanoj, Sinjorino *Amy Segerstedt*, kies multjara kaj sindona filantropio diskonigis kaj benignis nomon inter ĉiuj blinduloj en Svedujo. Unu el la produktaĵoj de ŝia iniciativo estas malnovaj, sed tre grandaj kaj ĉiutage kreskantaj bibliotekoj sciencaj kaj literaturaj. La verkoj zorge elektitaj, estas transskribitaj per la blindskribo de la franca filantropiulo Braille.

Pro tiuj, kiuj ne konas la genian «blindskribon» de Braille, mi permesas min sciigi, ke ĝi konsistas el punktoj en sistema aranĝo. La skribo estas farata sur speciala papero per malakra pikileto. La kopiisto «skribas» de dekstre maldekstren kaj la blindulo legas la skribon sur l' alia flanko glitigante la fingrojn palpe sur la relifaj punktoj de la papero.

La nomo de tiu ĉi nova blinda esperanto-

propagandanto estas *H. Thilander* en Euge-
niahemmet, Stockholm.

Antaŭ mi kuŝas du leteroj de tiu ĉi juna
samideano; unu skribita en la sveda lingvo,
l' alia en Esperanto, kies enhavo al mi ŝajnas
meriti veni sub la okulojn de la esperantistoj.
Dankinte Sinjorinon Segerstedt pro la ĵus ri-
cevitaj esperantaj libroj li skribas inter aliaj:

«Pensu se la blinduloj en ĉiuj landoj, kie la
instruado al la blinduloj rimarkinde progresis, ko-
mencus terni la internacian lingvon! Gazetoj kaj
libroj skribitaj en tiu ĉi lingvo tiam ne estus limig-
ataj de iaj lingvaj diferencoj kaj pro tio ricevus pli
multajn legantojn kaj aĉetantojn. Tio ĉi ebligus
presigi pli multajn kaj pli grandajn librojn por blind-
uloj. Fine (kaj tio ĉi estus eble plej grave) la dis-
vastigo de Esperanto inter la blinduloj kompreneble
ebligus kaj ankaŭ iom post iom ekzistigus diligentan
interŝanĝon de pensoj inter blinduloj de diversaj nacio-
j. Tiel eble oni povus fondi internacian universi-
taton por blinduloj

Vi kredu, ke la lingvo internacia elvokis intereson
ĉie en nia lando ĉe la blinduloj. La lastan tempon,
mi devis elporti malkvietajn atakojn per leteroj kaj
demandoj pri tiu ĉi lingvo. Ankaŭ en Anglujo, en
kies gazetoj mi skribis artikolojn pri l' afero, oni
komencis pripensi mian proponon ke oni devus uzi
Esperanton en la literaturo de la blinduloj. En nia
gazeto „*De blindas vekoblad*“ mi tenis restantan
rubrikon pri Esperanto, dum la tuta lasta kvaron-
jaro. Mi skribis ses ekzemplerojn de la vortaro kaj
ses gramatikojn; sed oni bezonas multajn tiajn. La
gramatikojn mi mem verkis, ĉar mi havas nenian
presitan gramatikon. Tial mi fervore deziras presitan
gramatikon kaj sintakson. Ho, mi bezonas multajn
librojn en la lingvo internacia. Dume ĉio kostas mo-
non, kaj mono ne estas por mi (ĉar la sorto donis
al mi nenion de tiu speco) kaj sekve ankaŭ ne
libroj. De kie do ekhavi librojn? . . .»

La esperantistaro havas, mi opinias, mor-
ralan *devon* subteni tiun ĉi novan favormovon
por Esperanto. La perfekta ellerno de nia lingvo
tie estas, ankoraŭ, treege pli malfacila ol alio-
loke pro manko de necesa por la blinduloj
legebla esperanta literaturo. La nova klara flamo

bezonas aeron, t. e. kompreno, intereso, ku-
raĝigo, aga simpatio de la esperantistoj, Ĉiu
povas ion fari. Ĉiu, laŭ kiu faroj estas pli va-
loraj ol frazoj, certe facile trovos la konve-
nan *manieron*. Ĉiu «kiel» havas sian «tiel». .
Al tiuj ĉi lastaj mi dume konsilas ekkomunikigi
kun la redakcio de «*De blindas vekoblad*» (en
Stockholm) aŭ donaci esperantajn verkojn uzitajn
al sinjoro Thilander por transskribo en la
skribon por blinduloj, aŭ eĉ mem fari tiajn
transskribojn. Mi certigas ke tiu laboro estos
sufiĉe plezuriga. Duonhora tre sufiĉas por la
ellerno de la skribsistemo; konvenan materialon
por la skribo oni povas ricevi de unu el la
institutoj malsupre nomataj, — l' alfabeton oni
povas ricevi de mi.

Multaj societoj en ĉiuj civilizitaj landoj la-
boradas por inteligenteca kaj materiala bono
de l' blinduloj, por doni al ili tiun lokon, kiun
ili meritas. Oni povas aparte citi la societ-
ojn *Maria Aleksandrovna* en Rusujo, *Valen-
tin Haüy* en Parizo, *Föreningen för blind-
skrift* en Stockholm . . . ne kalkulante
Anglujon, Germanujon, Amerikon. Tiuj societoj
fondis lernejojn, bibliotekojn, presejojn; sen-
page disdonas kuracistajn kaj advokatajn kon-
silojn al la blinduloj k. t. p. k. t. p. Sed la
diversnaciaj blindularoj ĝis nun mankis tiun
fadenon, tiun ligilon kiu ebligus al ili inter-
ŝanĝadon internacian de pensoj kaj laboroj.
Ili serĉadis la grandan vojon de l' unuling-
veco . . .

Jen estas ke ili ektrovis tiun ĉi vojon:
ĝojo, raviĝo elradias el liaj vizaĝoj; ili ko-
mencis la unuajn paŝojn, kaj serĉas palpante
kondukantan manon.

Ĉu ili ĝin trovos? . . .

Kara leganto, ĉu vi iam pripensis, kia via
sorto estus, se vi estus blinda?

Stockholm, la 1-an de Januaro 1902.

P. Ahlberg

sekretario de l' Klubo Esperantista en Stockholm.